The BRITISH ESPERANTIST.

THE OFFICIAL ORGAN OF THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION.

VOL° XV. N-RO 172. APRILO, 1919. PREZO 3 PENCOJ.

KOSTO DE ABONO.—*En Granda Britujo*, afrankite: por unu jaro, 3 ŝilingoj; unu numero, 3 pencoj.

Eksterlande, afrankite: por unu jaro, $o.75, fr.4.50; laŭ internacia mono, Sm.1.50.

Abonoj estas akceptataj ĉe la komenciĝo de ĉiu monato, kaj povas esti pagataj per poŝtmandato aŭ Ĉekbanka transpagilo. Sin turni al la Sekretario, *17, Hart-street, London, W.C.1.*

REDAKCIO.—Manuskriptojn, k.t.p., oni volu sendi al la Redaktora Komitato, 17, Hart-street, London, W.C.1. Tradukantoj antaŭ ol sendi siajn verkojn volu ĉiam certiĝi, se necese, ĉu la aŭtoro aŭ la originalaj eldonintoj permesas la represigon.

Pri artikoloj la Komitato rezervas al si la rajton korekti la erarojn de stilo, k.t.p. Ordinare oni ne resendas artikolojn neakceptitajn.

ANONCOJ.—Pri anoncoj, sin turni al la Direkcio, THE BRITISH ESPERANTIST, *17, Hart-street, W.C.1.*—Privataj anoncoj pri Esperantistaj naskiĝoj kaj edziĝoj estas enpresataj po 2 ŝilingoj por kvar linioj.

ENHAVO.

	Paĝo.
Esperanto kaj la Societo de la Nacioj	25
Letero de Malnova Samideano el Kanado. R. E. FAIRBAIRN	26
La Infano en la Tombo (Andersen), trad. L. L. ZAMENHOF	27
Konataj Kantoj, tradukis laŭ la muziko MONTAGU C. BUTLER	28
Coming Events—Chronicle—Press Notices ...	29
Nekrologoj:—G. L. BROWNE; D-ro GEO. CUNNINGHAM	31
Libraro kaj Gazetaro	32
Tenth British Esperanto Congress	32
B.E.A. Annual Circular	33
B.E.A. Annual Report	34
B.E.A. List of Guarantors, 1919—1920	35
B.E.A. Candidates for Membership, New Fellows and Councillor, Examinations, Council Meeting, F.K.I.	36

Esperanto kaj la Societo de la Nacioj.

La kreo de la Societo de la Nacioj estas nun afero nepridubebla. Tiu Societo havos rolon politikan gravegan ne nur dum la unua tempo de sia ekzistado, sed ankaŭ en la estonteco. Sed ĝia rolo eble ne estos nur politika: ĝi estos ankaŭ ekonomia kaj scienca. Tiun ĉi lastan punkton montris klere S-ro Charles Nordmann en la Numero de la 7a de Januaro lasta de l' "Revue des Deux Mondes." La Societo de la Nacioj, diras S-ro Nordmann, devos nepre sin okupi pri ĉiuj sciencaj demandoj havantaj karakteron internacian, kaj, inter ili, pri tiu de la reformo de la kalendaro, kiun la aŭtoro tiam disvolvas en ĝia pleneco. Nu, alia scienca demando de internacia intereso estas nedubeble tiu pri la officiala enkonduko de la L.I. La mondo havos baldaŭ la plej taŭgan okazon por realigi tiun grandegan kaj utilegan progreson: la Esperantistoj ankaŭ devus sin turni al la Societoj de la Nacioj kun la peto "interkonsentigi la Naciojn pri la deviga enkonduko de la studo de Esperanto en la lernejojn de la tuta mondo. Aliaj Esperantistoj pensis jam pri tio, ĉar en la jurnalo "Esperanto" de Januaro 1919, ni legas diversajn proponojn, inter kiuj, tiun de la komitato de B.E.A. (Britujo), kiu anoncas publikan manifestacion por subteni la alprenon de Esperanto en "La Brita Societo por Ligo de la Nacioj." Laŭdindaj iniciativoj, sed kiuj, izolitaj, ne sufiĉas! Niaj ĉefaj institucioj, la Akademio, la Centra Oficejo,* devus sin turni al la Societo de la Nacioj, klarigi al ĝi plej detale la demandon pri la L.I., teorie kaj praktike, t.e. doni la motivojn favorajn al la demando, konigi ĝian historian vidpunkton, kaj precipe, fari kiel eble plej plene kaj alloge la priskribon de la praktikaj rezultatoj akiritaj en la tuta mondo kaj en ĉiuj homaj aferoj dum nia pli ol 30 jara ekzistado, kaj fini pri la neceseco por la Societo de la Nacioj, enkonduki Esperanton kiel oficialan helplingvon internacian kaj trudi ĝian pristudon en la lernejojn de ĉiuj civilizitaj landoj de l' Terglobo.

Tamen, eĉ tiu agado ne estas sufiĉa, ĉar la estroj de la Societo de la Nacioj povas dubi pri la vera stato de nia disvasteco, de nia tutmonda graveco kaj forto: oni devus doni al ili palpeblan pruvon pri nia ekzistado, kaj tial la Brita manifestacio devus fariĝi tutmonda manifestacio. Ĉiuj Esperantistaj kluboj de l' mondo devus pritrakti la demandon ĉi tie priparolotan, organizi manifestaciojn kaj paroladojn, publikigi artikolojn pri ĝi, kaj multobligi la petskribojn, adresotajn ĉu al la Akademio ĉu al la Centra Oficejo, kiuj ilin komunikus al la Societo de la Nacioj kiel apogilojn kaj pruvilojn aldonitajn al la ĝenerala kaj detala klarigo de la demando pri L.I. ĉi supre aludita.

Estas eble, ke la diskutado de la demando en la tutmondaj Esperantistaj Societoj, havigus aliajn efektivigotajn rimedojn, sed unu punkto estas certa, ni devas montri al la Societo de la Nacioj nian ekzistadon, nian gravecon, nian forton, kaj ju pli granda estos la farota impreso, des pli utila kaj sukcesiga estos la jus dirita agado, des pli proksima estos nia triumfo.

La jus legitaj ideoj estis proponitaj kaj priparolitaj en la Genta Esperanto-Klubo "La Progreso" (Belgujo), fondita dum la milito. Ĝi insiste petas, ke ĉiuj samideanaj kluboj de l' tuta mondo agu kiel dirite, kaj ĝi kun plezuro ricevos ĉiujn petskribojn, de kie ajn ili venas; ĝi kolektos kaj transsendos ilin al la Centra Oficejo, se la kluboj ne preferas interrilatiĝi rekte kun ĉi tiu lasta.—L. COGEN, Vice-Prezidanto de la Genta Esperanto Klubo, "La Progreso," 12, Rue Maison-Dieu, Gento.

P.S.—Ĉiuj jurnaloj esperantistaj estas petataj enpresi ĉi tiun artikolon.

* Jam ĝi tion faris.

Letero de Malnova Samideano el Kanado.

Eble interesiĝus miaj gekonatoj de pasintaj tagoj, legi komunikaĵon de migrinta samideano, alparolanta el la transatlanta tero. Mi permesas al mi ion skribi rilate al Kanada vintra okazo. Hieraŭ mi partoprenis glitveturilan festenvojaĝon, kiun aranĝis donace por la ĥoristoj de mia preĝejo unu sinjoro. Li invitis nin (kompreneble la pastro anis ' laŭofice ') veturi are al sia lignaĵejo ĉirkaŭ dek mejlojn for en la arbaro kaj tie vespermanĝi kune. Kvindek personoj ĉeestis. Oni estis preparinta tri grandajn lignoportajn glitveturilojn, konstruinte benkojn laŭlonge kaj provizinte sufiĉan kvanton da felaj kovriloj. Kiam ni kunvenis ĉe la preĝejo, je la kvara posttagmeze, la suno estis subiĝanta en la okcidento, kaj neĝkovrita tero beliĝis per pale-bluaj ombroj inter la iom oranĝkoloraj lumlokoj. Per iom da bonhumora sinpremiĝo ni nin kunpakis en la veturilojn, kiujn tiradis paroj da fortaj kaj bravaj ĉevaloj. Ĉiam sonis ridado kaj kantado, ĉar ĉiu sin trovis en plej gaja spirito. Jam ĉesis la militado. Estas jam tempo, ke ni ridu, se ni povas, ĉu ne ?

Ankoraŭ ne estis falinta tro multe da neĝo, ĉar ĝis nun la vintro estas mirige milda por Kanado. En la Maraj Provincoj neniam okazas la teruraj frostoj de kvardek ĝis sesdek gradoj subnulaj, kiel en la okcidento. Estis ja apenaŭ sufiĉe da neĝo, ĉar en kelkaj lokoj la vojo senkovriĝis, tiel ke la gvidistoj devis iri vojflanke. Tiam la veturiloj emis skuiĝi kiel aŭtomobiloj sur kotglita vojo, kaj ĉiu knabino kaptis la okazon bleketi kvazaŭ pro timo. Niaj ĉevalgvidistoj estis tamen spertegulo j, kaj nenia malagrablaĵo okazis.

Veturinte eble sep mejlojn, ni forlasis la vojegon kaj eniris la arbaron. Jam velkis la oranĝa sunsubiĝa lumo ĝis pale-verda brileto sin montranta super la arbpintoj. Iu ekvidis la vesperstelon, kaj ĉiu aplaŭde salutis ĝin. Plimallumiĝis. Malrapide aliaj steloj dormeme malfermis la okulon kaj palpebrumis nin. Fariĝis tute nokto. Baldaŭ la ĉielo brilegis kiel vasta diamanta ekspozicio. Mirante mi konstatis, ke la vorto ' stellumo ' neniel estas nura poezia frazo. Efektive la steloj donis sufiĉan lumon, por ke la gvidistoj kontrolu la iradon inter la arbtrunkoj. (Mi devus diri, ke la luno forestis libertempe). Rekte supre la laktavojo etendiĝis trans la ĉielo kiel vasta gazskarpo iom ĉifonita per mallumaj makulegoj. La glitveturilaj sonoriletoj bele tintadis, akompanante la kantadon de la geknaboj. Mi silentis, atente ĝuadante ĉian elementon de la sentoplena okazo.

Subite iu ekvidis lamplumon tra la arboj, antaŭe. Ni maleniris arbaron kaj nin trovis ĉe la domaro de la lignaĵejo. Kantante kaj aplaŭdante ni salutis la renkontintojn kaj disiĝis el la veturiloj. Ĉi tie loĝadas dumvintre la lignaĵistoj, precipe fraŭloj. Estas tamen kelkaj familioj. Oni diris, ke sin trovas en la domaro ĉirkaŭ kvardek infanoj, kiuj devus iradi lernejon. Ŝajne ili prosperis kreski fizike se ne mense, ĉar mi neniam vidis tiajn belajn geknabetojn.

La viroj faligas la arbojn, distranĉas la trunkojn, kaj tiras la lignopecojn al la urbo, por hejti la domojn. Mi mem hejtas la pastran domon per lignobruliga forno. Ĉagrenas min iom enĵeti la bravajn pecegojn de fag-, betul-, kaj acer-ligno en fornon por detruiĝi. Sed mi devas konfesi, ke mi multe preferas la lignon kiel brulaĵon, kompare kun la karbo.

Amase ni eniris la domon de la ĉeflignisto. Troviĝis du grandaj ĉambroj, unu por lia familio, kaj la alia por la fraŭloj laboristaj. Ĉiuj kune kaj samtempe babiladis, ŝercis kaj ridadis, dum oni preparis la regalon. Tiun oni aranĝis sur du longaj tabloj. La ĉefa ero kompreneble estis bakitaj faboj. Ĉi tiu manĝaĵo korespondas al la ' rostita bovaĵo de malnova Anglujo.' Ĉiu Kanadano aprobus la ŝercdemandon, ' Kiam estas festeno nenia festeno ? Kiam mankas bakitaj faboj.' Certe, se la ' malŝparema filo ' estus Kanadano, tiam nenieł estus la grasigita bovido, kiu lin fortiris el la ' malproksima lando,' sed la 'bakitaj faboj. Mi konstatas, ke bakitaj faboj ĉiam estas bongustaj, sed por gusti la plej bonajn bakitajn fabojn, oni devus iri lignaĵejon en arbaro. Mi povas certigi, ke estis, laŭ Kanades-primo, ' ia ' regalo. Poste ni ĉiuj kunestis en la fraŭla ĉambro, kaj faris nepreparitan koncerton. La ĥoristoj kantis ĥore ; iu faris ŝercdeklamon ; kaj mi ankaŭ plenumis mian devon. Kelkaj el la laboristoj sciis bone ludi violonojn. Do, vice iuj el iliaj kamaradoj paŝdancadis, dum ili muzikas.

Je la deka horo, post dankparoloj al niaj gastigantoj, ni preparis nin por la reveno. Ankoraŭ pli da kantado kaj ridado dum la vojaĝo ! Estis iom pli da lumo, ĉar ĉe la nordhorizonto briletis vasta sed malalta arkaĵo de nordlumo. Supre de tio sin etendis palaj fingroj, kiuj etendiĝis, retiriĝis, kaj reetendiĝis.

Plenumante la konatan frazon, ni ne atingis la hejmon ĝis matenò. Tiel pasis unu el la plej senmikse feliĉaj okazoj, kiujn mi iam partoprenis.

Interesos anglajn samideanojn aŭdi, ke la Esperanta afero iom vekiĝas en Kanado. Vigla korespondado nun okazas en la Montreala *Weekly Witness*, kaj per tio, multaj izolitaj Esperantistoj trovas unu la aliajn.

Oni diras ankaŭ, ke estas fondita ' Kanada Esperanta Asoció ' en la okcidento.* Mi esperas, ke ĝi montros seriozan kaj energian karakteron, kaj sukcesos starigi nian aferon en la respekto de la Kanada publiko.

R. E. FAIRBAIRN,
Pastro.

Victoria Street, Amherst, N.S., Canada.
Jan. 31, 1919.

❦ ❦ ❦ ❦

Kiom Kostas la Milito

La plimulto de la homoj, kutimintaj kalkuli laŭ centoj kaj miloj, ne klare komprenas, kion prezentas precize la cifero de 800 miliardoj, kiujn la milito kostis ĝis nun al la diversaj militlandoj. Amerika ĵurnalo, tamen, venas al helpo, klarigante, ke la tuta kosto de la Amerika interna milito estas duobligata ĉiudusemajne en la nuna milito. Ĉiu kvinsemajna perido prezentas la tutan koston de la milito 1870-71. La 800 miliardoj permesus fosi 400-foje la Panaman Kanalon laŭ la prezo, kiun ĝi kostis, aŭ konstrui 92 fervojojn ĉirkaŭantajn a teron.—El *Hastings Observer*.

❦ ❦ ❦ ❦

Alvoko.

Ĉiu samideano, kiu ion scias pri

Fraulino Mina Lang,

de Kurz-Rickenbach-Svislando (naskiĝdato June 27, 1887) estas insiste petata tuj doni al mi informojn.

F-ino Lang—fratino de mia amiko—de 1907 ĝis 1912, restis en Londono kaj de tiam ne plu donis vivosignon. Malgraŭ klopodoj pere de la svisa ambasadejo, ŝi ĝis nun estis netrovebla. Ŝiaj adresoj estis :—

1. Craven Mansions, 5, Craven-terrace, Lancaster Gate.
2. York-street, 12, Portman Square.
3. c/o Mr. Cramer, Buckingham Gate 36.
4. c/o Birkbeck Bank.

Por ĉiu informo sinceran dankon.—E. Müller, Del. de U.E.A., Bodmerstrasse 5, Zürich.

---

* Prezidanto, S-ro CHESTER H. CROSSMAN, Lipton, Saskatchewan, Kanado.

La Infano en la Tombo.

Fabelo de Andersen.

Estis funebro en la domo, estis funebro en la koroj : la plej juna infano, kvarjara knabo, la sola filo, la ĝojo de la gepatroj kaj ilia espero por la estonteco, mortis. Estas vero, ke ili havis ankoraŭ du pliaĝajn filinojn, el kiuj la maljuna ĝuste en tiu jaro estis konfirmota, kaj ambaŭ estis ĉarmaj, bonaj knabinoj, sed la infano perdita estas ĉiam la plej kara, kaj ĉi tiu estis la plej juna kaj filo. Ĝi estis peza bato de la sorto. La fratinoj malĝojis, kiel malĝojas junaj koroj, tuŝitaj precipe de la doloro de la gepatroj ; la patro estis malgaja, sed plej profunde premita estis la koro de la patrino. Tage kaj nokte ŝi estis sur la piedoj, ŝi flegis la malsanan infanon, levadis ĝin kaj portadis sur la manoj. Ĝi estis parto de ŝi mem, tion ŝi sentis kaj konsciis. Ŝi tute ne povis prezenti al si, ke la infano mortis, ke ĝi estos metita en ĉerkon, ke la tombo ĝin baldaŭ ĉirkaŭos. Ŝi estis konvinkita, ke Dio ne povas forpreni de ŝi la infanon : kaj, kiam tio tamen fariĝis kaj estis jam afero senduba, ŝi diris en sia dolora suferado :

" Dio tion ne sciis, Li havas senkorajn servantojn ĉi tie sur la tero, ili agas laŭ siaj deziroj, ili ne aŭdas la preĝojn de patrino." Ŝi perdis sian fidon je Dio, kaj nun atakis ŝin mallumaj pensoj, pensoj pri la morto, timo je la porĉiama morto, timo, ke homo fariĝas polvo en polvo kaj per tio ĉio finiĝas. Ĉe tiaj pensoj ŝi havis nenion, al kio ŝi povus alkroĉiĝi, kaj ŝi falis en senfundan abismon de malespero.

En la plej malfacilaj horoj ŝi plu ne povis plori. Ŝi ne pensis pri la junaj filinoj, kiujn ŝi havis ; la larmoj de la edzo faladis sur ŝian frunton, sed ŝi ne rigardis al li ; ŝiaj pensoj ĉiam estis ĉe la mortinta infano, ĉiu spiro de ŝia vivo havis nenian alian celon, krom la peno revoki en sian memoron ĉiun detalon pri sia infano, ĉiun el ĝiaj senkulpaj infanaj vortoj.

Venis la tago de la enterigo. Kelkajn noktojn antaŭe ŝi ne dormis : ĉirkaŭ la mateno ŝin venkis laceco, kaj ŝi iom ekdormis. En tiu momento oni forportis la ĉerkon en pli malproksiman ĉambron, kaj oni albatis la kovrilon, ke ŝi ne aŭdu la frapojn de la martelo. Kiam ŝi vekiĝis, leviĝis kaj volis vidi sian infanon, la edzo diris kun larmoj :

—Ni albatis la kovrilon : tio estis necesa !

—Se Dio estas kruela kontraŭ mi,—ŝi ekkriis maldolĉe,—kial do la homoj estus pli bonaj !

Kaj ŝi forte ekploris.

La ĉerkon oni forportis al la tombo. La nekonsolebla patrino sidis apud siaj junaj filinoj, ŝi ilin rigardadis ne vidante ilin, ŝiaj pensoj havis plu nenion komunan kun ŝia cetera familio, ŝi fordonis sin al sia malĝojo, kaj ĉi tiu ŝin pelis sen ordo, kiel la maro pelas ŝipon, kiu perdis la remilojn kaj direktiliston. Tiel pasis la tago de enterigo, kaj multaj aliaj tagoj sekvis kun la sama unuforma peza doloro. Per malsekaj kaj malĝojaj okuloj ŝin rigardadis en la domo la funebrantoj ; ŝi ne aŭdis iliajn vortojn de konsolo ; kaj cetere kion ili povus diri ? Ili ja mem estis tro malgajaj.

La dormon ŝi kvazaŭ tute plu ne konis, kaj tamen la dormo povus ja estis ŝia plej bona amiko, refortigi ŝian korpon kaj redoni trankvilecon al ŝia animo. Per admonoj oni tamen atingis almenaŭ tion, ke ŝi kuŝiĝis en la liton, kaj ŝi kuŝis silente, kiel dormantino. En unu nokto ŝia edzo aŭskultis ŝian spiradon kaj kredis kun certeco, ke ŝi trovis trankvilecon kaj refresiĝon : tial li kunmetis siajn manojn, preĝis kaj baldaŭ ekdormis sane kaj forte. Tial li ne rimarkis, ke ŝi leviĝis, surmetis, siajn vestojn kaj silente eliris el la domo, por iri tien, kie ŝiaj pensoj restis tage kaj nokte, al la tombo, kiu kaŝis en si ŝian infanon. Ŝi iris tra la ĝardeno, kiu ĉirkaŭis la domon, kaj eliris sur la kampon, kie piedvojeto ĉirkaŭe de la urbo kondukis al la tombejo : neniu ŝin vidis, kaj ankaŭ ŝi vidis neniun.

Estis bela stelluma nokto ; la aero estis ankoraŭ varma kaj milda, ĉar tiam estis ankoraŭ Septembro. Ŝi eniris an la tombejon kaj direktis sin al la malgranda tombo, kiu vidiĝis kiel unu granda kaj bonodora bukedo. Ŝi sidiĝis kaj klinis sian kapon al la tombo, kvazaŭ tra la dika tavolo da tero ŝi povus vidi sian knabeton, kies ĉarman rideton ŝi ankoraŭ tiel bone memoris. La bonkora esprimo de liaj okuloj, eĉ ankoraŭ sur la lito de malsanulo, estis ja neniam forgesebla. Kiel multeparola estis lia rigardo, kiam ŝi sin klinadis super lin kaj prenadis lian delikatan maneton, kiun li mem ne povis levi ! Kiel ŝi antaŭe sidis apud lia lito, tiel ŝi sidis nun ĉe lia tombo ; sed ĉi tie la larmoj povis libere flui, ili faladis sur la tombon.

—Vi volas malsupren, al via knabo !—subite diris ia voĉo ĝuste apud ŝi ; la voĉo sonis klare kaj profunde, ĝi sonis al ŝi en la koron.

Ŝi ekrigardis supren, kaj apud ŝi staris homo, kovrita de granda funebra mantelo, kies kapuĉo estis tirita antaŭen super lia kapo. Sed sub la kapuĉo ŝi vidis lian vizaĝon, ĝi estis severa, sed tamen konfidiga, kaj liaj okuloj brilis, kvazaŭ li havus ankoraŭ la aĝon de junulo.

—Mi volas al mia infano !—ŝi ripetis, kaj en ŝiaj vortoj estis petego de malespero.

—Ĉu vi kuraĝas sekvi min ?—demandis la figuro.—Mi estas la Morto !

Ŝi balancis jese la kapon. Tiam subite fariĝis, kvazaŭ ĉiuj steloj super ŝi lumus per la lumo de plenluno ; ŝi vidis la belegan divers kolorecon de la floroj sur la tombo, la tera kovro delikate kaj silente forŝoviĝis kiel fluganta tuko, la patrino malleviĝis, kaj la figuro etendis ĉirkaŭ ŝi sian nigran mantelon. Fariĝis nokto, la nokto de la morto ; ŝi malleviĝis pli profunden, ol kiom penetras la tomba fosilo, la tombejo kuŝis tiel tegmento super ŝia kapo.

La basko de la mantelo ŝoviĝis flanken ; ŝi staris en grandega halo, trê vasta kaj agrabla. Ĉirkaŭe regis krepusko, sed antaŭ ŝi staris ŝia infano, kiu tuj alpremiĝis al ŝia koro. Ĝi ridetis al ŝi kaj brilis per beleco pli granda ol iam antaŭe. Ŝi ekkriis, sed la krio ne estis aŭdebla, ĉar tute proksime de ŝi kaj poste tre malproksime kaj denove tre proksime eksonis laŭta mirinde ĉarma muziko. Neniam antaŭe tiel ravantaj tonoj tuŝis ŝian orelon ; ili sonis transe de la noktenigra densa kurteno, kiu apartigis la halon de la granda lando de eterneco.

—Mia dolĉa, mia kara patrino !—diris ŝia infano.

Ĝi estis la konata amata voĉo ; kaj kisoj sekvis post kisoj en senfina feliĉego. La infano montris en la direkto al la malluma kurteno.

—Tiel bele ne estas supre sur la tero ! Ĉu vi vidis, panjo, ĉu vi vidas ilin ĉiujn ? Ĉu tio estas feliĉego !

Sed la patrino vidis nenion, eĉ tie, kien la infano montris, nenion krom la nigra nokto ; Ŝi rigardis per teraj okuloj, ŝi ne vidis tiel, kiel vidis la infano, kiu estis venigita al Dio. Ŝi aŭdis la sonojn, la tonojn, sed ne la vorton, kiun ŝi devis kredi.

—Nun mi povas flugi, panjo !—diris la infano,—flugi kun ĉiuj aliaj gajaj infanoj rekte al la bona Dio. Mi tre dezirus tion fari, sed se vi ploras, kiel nun, mi ne povas foriĝi de vi, kaj mi tamen tiel dezirus ! Ĉu vi ne permesas ? Vi ja baldaŭ venos al mi, kara panjo.

—Ho restu, ho restu !—ŝi respondis,—nur unu momenton ankoraŭ ! Unu solan fojon ankoraŭ mi devas vin rigardi, vin kisi vin teni en miaj brakoj !

Kaj ŝi kisis kaj alpremis al si la infanon. Subite de supre eksonis ŝia nomo ; treege plende ŝonis la tonoj. Kio ĝi estis ?

—Ĉi vi aŭdis ?—diris la infano.—Ĝi estas paĉjo, kiu vin vokas ! Kaj denove eksonis post kelkaj sekundoj profundaj ĝemoj, kvazaŭ de plorantaj infanoj.

—Ĝi estas miaj fratinoj!—diris la infano;—panjo, vi ja certe ilin ne forgesis!

Kaj ŝi memoris la restintojn, neesprimebla korpremo ŝin atakis, ŝi ekrigardis antaŭen, kaj senĉese preterflugetadis figuroj, el kiuj kelkajn, kiel ŝi opiniis, ŝi rekonis. Ili flugetis tra la halo de la morto al la malluma kurteno kaj malaperis malantaŭ ĝi. Ĉu aperos ŝia edzo, ŝiaj filinoj? Ne ilia voko, iliaj ĝemoj sonis ankoraŭ de supre; ŝi preskaŭ tute forgesis ilin pro la mortintoj.

—Panjo, nun sonas a sonoriloj de la ĉiela regno!—diris la infano.

—Panjo, nun leviĝas la suno!

Kaj torento da blindiga lumo versiĝis sur ŝin; la infano malaperis, kaj ŝi sentis, ke ŝi portiĝas supren.

Fariĝis malvarme ĉirkaŭ ŝi, ŝi levis sian kapon kaj vidis, ke ŝi kuŝas sur la tombejo, super la tombo de ŝia infano. Sed Dio fariĝis por ŝi en la sonĝo apogo por ŝia piedo, lumo, por ŝia prudento; ŝi fleksis siajn genuojn kaj preĝis:

"Pardonu min Sinjoro, mia Dio, ke mi volis reteni eternan animon de ĝia flugo, ke mi povis forgesi miajn devojn rilate la vivantojn, kiujn Vi donis al mi!"

Ĉe tiuj ĉi vortoj ŝi sentis, ke ŝia koro senŝarĝiĝis. Jen la suno aperis, malgranda birdo kantis super ŝia kapo, kaj la sonoriloj de preĝejo sonis por la matena preĝo. Sankta silento etendiĝis ĉirkaŭe, sankte, kiel en ŝia koro! Ŝi rekonis denove sian Dion, rekonis siajn devojn, kaj plena de sopiro ŝi rapidis hejmen. Ŝi kliniĝis super sian edzon, ŝiaj varmaj sinceraj kisoj lin vekis, kaj ŝi ekparolis vortojn, venantajn el la profundo de la koro. Ŝi estis denove forta kaj milda, kiel edzino povas esti, kaj de ŝi venadis nun riĉa fonto de konsolo.

"Kion Dio faras, estas bone farita!"

Kaj la edzo ŝin demandis:

—De kie vi per unu fojo ricevis tiun forton, tiun koron plenan de konsolo?

Kaj ŝi kisis lin kaj kisis siajn infanojn.

—Mi ricevis ĝin de Dio, per mia infano en la tombo.—

El *La Revuo*, 1908. El germana lingvo tradukis L. L. Zamenhof.

* * * * *

KONATAJ KANTOJ.

Tradukis laŭ la muziko Montagu C. Butler.

DISIĜO (A Farewell).

Neniu kant' el miaj lipoj pasos,
Sub grizĉielo ne kantemas kor';
Al vi mi tamen lecionon lasos
Por ĉiu hor'.

Mi vin instruos kanti harmonion,
Ne ĝin egalos eĉ alaŭd-antem',
Kaj fari pli poetan melodion
Ol Shakespeare mem.

Bonestu vi, aliaj estu lertaj;
Aganto estu vi, ne nur revant';
Kaj tiel viv', mort', kaj la vasteterno
Farigos kant'.

FORGESU NI! (Let Us Forget).

Forgesu ni, ke anŭs ni kun ard',
Ĉion forgesu el la kar memor'
Pri mola tuŝ' aŭ dolĉa ekrigard',
Kiu enlasis amon al la kor'.

Ni nur sidadu sur la flora ter',
Dum birdoj kantas laŭdojn al somer';
Nur vivu ni kun infaneca kor',
Sole pensante pri la nuna hor'.

SERENADO (Schubert).

Dolĉajn pledojn mi elspiras
Tra la nokt' al vi:
En la boskon, karulino,
Venu vi al mi.
Sopireme susuradas
||: Arboj sub la lun' :||
Ne prokrastu, amatino,
Sed elvenu nun.

Jen! la najtingalo kontas
Por inviti vin;
Per mallaŭtaj dolĉaj tonoj
Ŝi kompatas min.
Simpatie ŝi komprenas
||: Pri la omdolor'; :||
Kaj vibradas ĉe la kanto
||: Ĉiu ama kor' :||
Korulino, min kompatu
Mi petegas vin,
Lasu, ke mi proksimiĝu,
||: Ho, ĝojigu min' :||
Ĝojigu min.

HO REMEMOR'! (O Memory!)

Trio de H. Leslie.

Ho rememor'! Ho belmemor'!
Rifuĝas ni kun ĝoj' al vi
Per vi revenas ĉiu hor'
De l' (dolĉa) kara pasintec';
Amatiĝas eĉ dolor'!
Nin surspiru je magiec.

KONAS MI BELGARDENON.

(I Know a Lovely Garden).

Konas mi belĝardenon
Plenan je dolĉaj floroj—
Kaj tie mi vagadas,
Dum pasas ravaj horoj.
Ĉar l'amo tie floras
Sub hela sunradi',
Kaj Di vidante benas
Al amo, vi kaj mi.

Chappell & Co. *Muziko de* Guy d'Harcelot.

HIRUNDARO HEJMEN FLUGAS.

Hirundo hejmen flugas; Velkis lasta roza flor';
En la bosko najtingalo plu ne ĉarmas al la kor'.
Pense mi demandas min—"Ĉu mi ree vidos vin?"
Hirundaro hejmen flugas; Velkis lasta roza flor!

Kiam cignoj suden migras al la fajra okcident',
Kie kreskas orcitronoj en pli varma kontinent'—
Mia koro kun obstin revas tiam sole vin;
Dolĉe flustras la espero, ke ni ja revidos nin.

CHRONICLE.

Matter for the Chronicle should be sent to the Editor not later than the 15th of the month, for insertion in the following number. Reports may be in English. Matter for "Coming Events" (which should be as concise as possible) may be sent in up till the 20th. Secretaries, please note Address : **17, Hart-street, London, W.C.1.**

COMING EVENTS.

Diservo Esperantista okazos dimanĉon, April 13, je 3.15, en *Harecourt Church, St. Paul's-road, Canonbury*, N.1, kiam parolos S-ro C. A. Fairman.

Saturday Afternoons.—April 12, 19 and 26, and May 3, meeting place for Esperanto conversation : the National Gallery, Trafalgar Square, at 2.30 p.m., Room No. 1. Afternoon tea, 4 p.m., Lyons' restaurant, next the Coliseum, St. Martin's Lane.

Londona Federacio.—La milito pasas, kaj la vorto *rekonstruo* ĉiuflanke resonadas. Jen la momento kiam ni ankaŭ devas rekonstrui kaj organizi pli efike niajn klopodojn por Esperanto en Londono. Nia Prezidanto, S-ro Geo. J. Cox, kiu nun revenis el la armeo, konvinkiĝis, ke per unuigita atako, ni povos ĉi tiun jaron kapti la instruistojn per paroladoj en la diversaj regionaj kunvenoj de la Instruistaj Asocioj ; kaj tiamaniere forte starigi la lingvon en la lernejoj. Sed estas necesa por tio kunligita kaj persistema atako ; pro kiu ni bezonas helpon de ĉiuj grupoj. Do, ĝenerala kunveno okazos por aranĝi diversajn aferojn, kaj speciale elekti la oficistojn por la venonta jaro, laŭ la novaj reguloj de filiigo al la B.E.A. Loko : British Schools, Kentish Town-road, N.W., Sabaton 12 de Aprilo, 4h. 30 ĝis la 9 horo.

Sabaton, la 24an de Majo, okazos paŝvagado por viziti la Horniman'an Muzeon (Lordship Lane, Dulwich) Renkontiĝu je la tria ĉe Camberwell Green, de kie S-ro C. A. Fairman gvidos la vizitantojn. *Parolu Esperanton* kaj mirigu la najbarulojn.

GENERAL.

Esperantista edziĝo en Antverpeno.—Sabaton, la 25an de Januaro, 1919, okazis en Antverpeno la edziĝo de S-ro John Pryor Nix, Sekretario de la Esperantista Grupo de Eastbourne, kun F-ino Gabrielle Herickx, komitatanino de la Antverpena Grupo Esperantista.

Multaj Antverpenaj gesamideanoj ĉeestis tiun ceremonion solenatan en la antikva urbdomo de la Skeldurbo, de la Skabeno S-ro Frans Steger, kiu, konigante angle al la angla fianĉo la edzajn rajtojn kaj devojn, kaj france al la belga fianĉino la edzinajn rajtojn kaj devojn, speciale gratulis la internacian novan paron.

Post la oficiala parto, gesinoroj Nix iris en la "Leys" salonon de la Urbdomo, kie atendis ilin la Antverpenaj geamikoj. S-ro Oscar Van Schoor, Prezidanto de la Antverpena Grupo Esperantista, alparolis la novedzigitojn kaj elokvente tradukis la fratajn sentojn kaj esprimis la tutkorajn gratulojn de la lokaj Esperantistoj, je kies nomo li donacis al la novaj geedzoj beletan kupran juvelujon kiel memoraĵon je tiu feliĉiga tago.

S-ro Nix, je sia propra nomo kaj je tiu de sia edzino, emociplene dankis la ĉeestantojn kaj per kelkaj vortoj rakontis, kiel li intencis deklari en Aŭgusto, 1914, ĉe la Pariza Kongreso en Parizo, sian amon al la de li elektita estonta edzino, kiel la efektivigo de tiu intenco estis malhelpita de la terura Mond-milito, kiel li tamen, per la dangerplena vojo de sekretaj leterportistoj sukcesis atingi sian celon, trans ĉiuj malamikaj bariloj, kaj daŭrigi, dum la tuta Germana okupado de Belgujo, regulan korespondadon kun sia fianĉino, kaj prepari kun ĉi tiu ilian edziĝon.

Ni ankoraŭ notu, ke nia amiko Nix edziĝis en uniformo de soldato de la Brita armeo, en kiu li deĵoris dum tri jaroj, kaj ke li elektis kiel oficialan atestanton de lia edziĝo sian malnovan kamaradon Frans Schoofs el Antverpeno.

Esperanto kaj Socialistoj.—Okaze de la Internacia Socialista Konferenco en Bern, la Vicdirektoro de U.E.A., S-ro Ed. Stettler kaj S-ro R. de Saussure aranĝis Esperantan ekspozicion, kiu estis lokita en magazeno ĝuste kontraŭ la konferencejo, kaj altiris la atenton de la publiko. Propagandiloj estas ankaŭ disdonitaj, kaj oni faris personan propagandon ĉe kelkaj delegitoj. Fine, dank' al la klopodoj de S-ro Edm. Privat rezolucio rekomendanta al la konferenco la studadon al la demando pri lingvo internacia estas subskribita de delegitoj Cachin, Lonquet, Mistral, Renaudel, Henderson, MacGurck, Benfield, sed pro manko de tempo ĝi ne povis esti diskutata. El interparoloj kun delegitoj rezultas, ke la demando pri internacia lingvo, tamen tiel grava por la socialistaj rilatoj, estas ankoraŭ tro malmulte atentata kaj ke la socialistaj "eminentuloj" havas pri nia movado informon tre nesufiĉan. Energia ĉiulanda propagando estas necesa.—*El Esperanto.*

LONDON.

B.E.A. Literatura kaj Debata Societo.—La laboro daŭre progresas, kaj oni nuntempe ellaboras planon por interesigi eminentajn anglajn verkistojn k.t.p. pri Esperanto. Detalojn pli poste.

La ĉefa laboro farita lastatempe estas la eldono de la unua kajero de "Literaturo," la nova Esperanta revuo de literaturo. Ĝia enhavo estas intersega, kaj la abono estas 2/6 jare. Hon. Sek., B.E.A., L. & D.S., 254, Wightman Road, N.8.

Canning Town.—*P.A.S. Klubo.*—La grupo, kiu naskiĝis 20 Marto, 1918, pro la iniciativo de F-ino F. H. Hanbury, helpata de S-roj M. C. Butler kaj Harrison Hill, aranĝis festi sian unuan jaron je la 19a de Marto. Dum la jaro la plej grava laboro estis instruado de varbitoj. Pastro Young interesiĝis kaj atentigas siajn preĝejanojn al la afero. Dum la somero oni faris ekskursojn al Epping Forest. Estas nun dudek konstantaj membroj.—C.V.

In connection with League of World Friendship an Esperanto Circle was formed on March 25th. A class is to be held every second Tuesday in the Drawing Room of the "1917 Club," 4, *Gerrard-street, London, W.* The first evening was conducted by Sgt. K. Sheldrake, who leads the Circle. The next meeting will be held on April 8, at 7.30 p.m., thenceforth fortnightly.

Société Internationale de Philologie Sciences et Beaux Arts, 8, Taviton Street, Gordon Square, W.C.1.—On Feb. 24, owing to the indisposition of Dr. J. Pollen, a lecture "The Language of the League of Nations" was delivered by the Sec. of the Esperanto Section of the Société, Sergeant B. W. Khalid Sheldrake, A.S.P., F.P.C. (Lond.). His lecture was well received and several enquiries have resulted. I am pleased to state also that the Esperanto Section of the "Société" is increasing its membership. On March 24, Mr. Bernard Long, B.A., spoke on "The Vocabulary and Structure of Esperanto."—D-RO LÉON.

ELSEWHERE.

Edinburgh.—La 19an de Februaro la programero estis traktaĵo de S-ro A. Whitehead sub la titolo "La Religio de la Naturo." Pro la neevitebla malĉeesto de S-ro Whitehead, S-ro Harvey, afable legis la tradukaĵon. La 26an de Februaro S-ro McCallum elektis la temon "Pri Skotaj Landlimoj." La 5an de Marto

S-ro And. Wilson elektis la temon "Impresoj ricevitaj en Francujo." La 12an de Marto ni havis la grandan plezuron bonvenigi la lernantojn de S-ro Scott el Donaldson's Hospital. Ili konsistis el geknaboj ĉirkaŭ dek-kvar-jaraj, kiuj regalis nin per kantoj kaj deklamoj. La junuloj estis akompanataj sur la piano de F-ino Southern, kiu ankaŭ ludis pianosolaĵon.

Eastbourne.—ST. SAVIOUR'S CHOIR SCHOOL ESPERANTO CLASSES.—The elder boys of this school have now been learning Esperanto for a year (one hour per week) under the careful tuition of Miss Ethel Martin.

At the annual prize-giving last month the headmaster, the Rev. C. W. Horsburgh, M.A., spoke enthusiastically of the educational value of the language. He said he had heard that young students of Esperanto became keener on their other work, and he had found this quite true; the boys were very keen, and their new study had undoubtedly widened their outlook and brought a new interest into their lives. They were now corresponding with schoolboys in Sweden, Russia, Belgium, Spain and France, which would, of course, have been an utter impossibility without the aid of this international language. Many of the boys are Scouts, and they are also in correspondence with Esperanto Scouts in other parts of England.

Mr. Horsburgh is so pleased with the progress made and the great success of the experiment that although originally only the upper form boys received lessons, now every boy in the school is learning "Nia kara lingvo."—C.S.R.

Glasgow.—La ĉiujara kunveno de la Esperantista Societo okazis je la 17a de Marto, kiom S-ro G. Douglas Buchanan prezidis. La kutimaj financa, biblioteka konsula (U.E.A.) raportoj estas prezentitaj. Konsidere la cirkonstancojn la stato de la societo estas sufiĉe kontentiga. Ni havis la plezuron bonvenigi tri fervorajn samideanojn malmobilizitajn, nome, Sinjoroj D. Kennedy, J. B. Anderson kaj W. R. Hall.

Unu el la plej interesaj paroladoj dum la vintro estas farita de Japana samideano, S-ro Soichi Tsuchiya, pri "Japana lingvo kaj literaturo." Li lerte priskribis la japanan lingvon kaj povis montri ĝian malfacilecon kaj la valoron de Esperanto por la Japanoj.

La Glasgova "Parol-Rondo," t.e. konversacia klubo, ankoraŭ daŭrigas sian utilan helpon al la komencantoj, kaj la muzikaj vesperoj estas allogaj. Dum la lastaj kvar monatoj bedaŭrinde mankas al ni, pro malsano, nia laboregema kaj lerta sekretariino S-ino E. M. de Montoro.

Inter la lasttempaj vizitintoj ni povas raporti la jenajn: S-ro Harrison Hill, vic-prezidanto de la B.E.A.; S-ro J. D. Applebaum, prezidanto Lancs. kaj Cheshire Federacio, kaj S-ro J. Couceiro, kiu estas ŝip-servistestro. Li propagandas Esperantan tra la mondo kaj havas veran bibliotekon da ĵurnal-elĉerpitaĵoj pri siaj vizitoj al diversaj landoj.

Je la 28a de Februaro S-ro Cedric F. White faris paroladon pri Esperanto ĉe la Glasgova Stenografia Asocio. S-ro Keith prezidis kaj esprimis sian simpation kun la movado. La ĉeestantaro tre interesiĝis, kaj kelkaj anoj anoncis la intencon studi la lingvon.

Je la 22a kaj 23a de Februaro okazis sukcesplena semajn-fino. Ĝi komenciĝis sabaton per internacia kaj fantazia kostum-balo ĉe la "Trades House." Pli ol 150 ĉeestis, kaj la diversaj belaj kostumoj, la bona orkestro, k.t.p., faris la festenon tre ĝuinda. Dimanĉon vizito estas farita al la Art-Galerio, kaj poste 25 gesamideanoj prenis teon ĉe la "Parol-Rondejo." En la vespero S-ro W. M. Page predikis ĉe diservo en la kunvenejo de la Partick Esperanta Societo—Y.M.C.A., Partick. S-ro Harrison Hill prezidis, kaj estis tie kuraĝiga ĉeestantaro.

Dum kelkaj jaroj la Skota Federacio klopodis enkonduki Esperanton en la someran lerneion por instruistoi. Tiu okazas mezsomere por unu monato en St. Andrew's, Skotlando. Se la lernejo funkcias tiun ĉi jaron, estas decidite permesi la instruon de Esperanto. Tiu estas ja grava novaĵo, pro tio ke ĝi sekvas nian sukceson ĉe la edukaj aŭtoritatoj, el kiuj dek du instruas Esperanton en Skotlando per pagitaj instruistoj—entute 17 vesperaj kursoj. Post Majo, 1919, la nova Edukada Leĝo anstataŭigas 944 komitatojn per 38 aŭtoritatoj. Tio tre faciligos la federacian laboron, kaj en la jam favora atmosfero ni antaŭvidas bonegan sukceson en la venonta vintro. La sekretario de la Skota Esperantista Federacio deziras interŝanĝi statistikan informon pri oficialaj kursoj, nur pri tiuj kun pagitaj instruistoj. Adreso: Cedric F. White, 280, *Bath-street, Glasgow.*

Keighley.—On Feb. 12, under the auspices of the the Educational Department of the Keighley Industrial Co-operative Society a lecture on Esperanto was given by Mr. F. C. Rhodes, of Oakworth. An interesting discussion followed. The chair was occupied by Mr. J. Rhodes, President of the Yorkshire Esp. Federation.

Pembroke.—La Esperanta kurso komencita ĉi tie lastan Oktobron ĵus finiĝis la 5an de Marto. En Amikeca kunveno la kursanoj faris belan donacon al la intruisto S-ro L. Adams; kantoj, deklamoj kaj ludoj finis tre interesoplenan vesperon. La kursanaro iom malpliiĝis dum la sezono sed faris bonan progreson sub la sperta instruado de S-ro Adams. Interesatoj sin turni al S-ro Wm. S. Laing, Hon. Sek., 161, Southdown Rd., Wavertree, Liverpool.

Sheffield.—La 3an de Februaro, je la invito de la konsilantaro de la Sheffield Y.M.C.A., D-ro John Pollen faris publikan paroladon pri Esperanto.

S-ro J. Newton-Coombe, konsilanto de la Universitato de Sheffield, prezidis. Li malfermis la kunvenon per bonega parolado, en kiu li aludis la cirkonstancojn, kiuj lin Esperantistigis.

D-ro Pollen diris, ke la homo estas la sela estaĵo, kiu ne povas kompreni sian eksterlandan najbaron. Birdoj, fiŝoj kaj bestoj parolas la saman lingvon ĉie en la mondo. Por sukcesigi la celojn de la venonta "Ligo de Nacioj" oni devas havi ian arteferitan lingvon fonditan sur neŭtrala bazo. El tridek delegitoj ĉe unu packonferenco dudek du parolis la hispanan, dek kvin la francan, kaj nur ok la anglan lingvon; do, estas facilimageble, ke oni ne povas elekti la anglan, nek iun alian nacian lingvon. Esperanto ne malebligus estontajn militojn sed ĝi malebligus, ke ili ozazu pro malkompeniĝoj, k.t.p.

Sen la hindustana lingvo, la diversgentuloj de Hindujo ne povas sin komprenigi, sed ĝia uzado ne malhelpas la kreskadon de la provincaj lingvoj. Laŭ la sama regulo oni povas certigi, ke Esperanto ne malhelpus la disvolviĝon de la Eŭropaj lingvoj. D-ro Pollen finis per mallonga skizo pri la strukturo de la kara lingvo kaj ŝajne konvinkis la aŭdantaron pri la simpleco, beleco kaj taŭgeco de Esperanto.

Poste, paroladetoj estis faritaj en Esperanto, de S-roj J. Newton-Coombe, J. Merchant, N. Roberts, E. Rodger kaj M. Pearson.—R.H.

On March 10, Mr. Maurice Pearson lectured on Esperanto before the Fulwood Social Guild.

South Shields.—A class of 20 students has begun here in the local branch of the Socialist Labour Party, under the energetic leadership of the Secretary, Mr. R. H. ROBERTS, 28, *Northbourne Road, Jarrow-on-Tyne,* who will gladly send particulars.

Torquay.—On the 17th of February, in the Old Town Hall, Miss Mitcalfe read a very interesting paper on "Esperanto as an Auxiliary Universal Language." She drew attention to the difficulties of the delegates to the Peace Conference, owing to the want of a common language, "that assemblage of persons who can only imperfectly understand one another, and who must, nevertheless, arrive at decisions which will affect the

fate of millions for generations to come." She showed that a League of Nations without a common language is an impossibility. She then showed that the language required—Esperanto—is already in existence, firmly established, spoken by thousands, and awaiting only official recognition to become the universal medium of intercommunication between the nations. She related how, in the fateful August of 1914, the war overtook the 4,000 Esperantists from 35 different countries assembled in Paris for the tenth Congress, and how these terrible, destructive years of war, which must have killed any international movement less robust, has not killed but only strengthened and proved the value of the Esperanto Associations all over the world. She also spoke of the brilliant success of the International Esperanto Experiment of 1917, a three months' course for business men and women begun simultaneously in London and in six other countries, to be tested at the end of the three months by putting the various participants into communication with one another. The day of the international common language will most surely come, concluded the lecturer. The question is only shall we muddle on for another twenty years or so without it, or shall we have it now? The answer is in the hands of the educational authorities.

Press Notices since our last:—*Evening Standard, Newspaper World, The Clarion, Christian Commonwealth, Sunday Evening Telegram* (every week in Esperanto), *Burnley News, Colne Times, Bulletin* (Glasgow), with illustrations, *Glasgow Evening Times, Glasgow Herald, Glasgow News, Keighley News, Lancashire Daily Post, Manchester City News, Illustrated Chronicle* (Newcastle) every week, *Sheffield Daily Telegraph, Shields Daily Gazette, Torquay Directory, Warrington Examiner, Yorkshire Observer, Yorkshire Post.*

